

# DIA REGNO

ISSN 0167-9554

# DIA REGNO

\* dumonata kristana revuo en esperanto \* n-ro 4 (865) \* 2007 \*



## KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia  
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el  
diversaj landoj kaj per Esperanto  
diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto:** Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,

FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;

☎ +33 (0) 549468021;

✉ keli@chez.com

**Sekretario:** Pavel Polnický; Na Vinici 110/10

✉ CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio;

☎ +420 325 615 651;

✉ Cea.polnický@quick.cz

**Kasisto:** Siegfried KRÜGER

✉ Claudiusweg 10,

DE 74074 Heilbronn, Germanio;

☎ +49 7131 162688;

✉ SLKrueger@gmx.de

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume  
€20,- \* Membro-subtenanto €30,- \* Nura abono:  
pagante rekte al KELI €16,- \* pagante al Libroservo  
€18,- \* Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita  
letero al la kasisto de KELI. \* Se estas en via lando  
UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu  
prefere pagi al UEA por konto **keli-p** de KELI \*  
Nederlanda poŝtĝirkonto de KELI: 5506132.

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon [www.chez.com/keli/](http://www.chez.com/keli/)

## DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908  
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

**Redaktoro:** Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Storgatan 6 A; S 153 30 Järna; Svedio;

☎ +46 (70) 2004574;

✉ dr\_board@yahoo.se

**Kontrollegis:** Éva FARKAS -TATÁR

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ  
egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la  
kasisto de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la  
aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke  
oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ  
traduko oni sendu al la redaktoro.*

**Ekspedado:** Pavel Polnický

Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio

✉ info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec

## ENHAVO

La kristana amo: enkonduko	51
Ĉu mi tutkore kantu?	55
Katedralo? Baziliko?	57
Heroldo de senkompromisa homeco	59
Preskribo	61
Impresoj de la kongreso	63
Protokolo de la jarkunveno	67
Taoismo en Ĉinio	70
Dankon	71
Sekvontjara kongreso	72
Cafebabel.com Novaĵoj sur la reto	73
Informetoj	74
Lilly Vikström	75
Ni konscias kaj akceptas	76

## REDAKTORAJ VORTOJ

Tiu ĉi numero iom malfrue pretiĝis, kaj mi multe bedaŭras tion. Tio tamen kunportas la bonan novaĵon ke vi verŝajne ne devas same longe atendi ĝis la sekvonta numero.

La nuna numero temas kompreneble multe pri la somera ekumena kongreso. Bedaŭrinde ne multaj KELI-anoj povis partopreni. Mi mem havis la eblecon kune kun mia familio ĉeesti kaj ĉiam estas instiga afero renkonti tiom da esperantistaj kristanoj. Ĉu ankaŭ vi havas impresojn kaj spertojn pri someraj aŭ alitempaj renkontiĝoj? Mi volonte publikigos ilin.

Dum la kongreso mi rimarkis ke ne nur mi povas ankoraŭ multe evolui lingve. Kaj, se la ĝuo dum niaj renkontiĝoj estas la frukto de nia laboro, ni devas nun komenci novan laboraron por ke ni kaj persone kaj organize fortiĝu. Eble nun estas la tempo fari la kutiman "novjaran" promeson.

**G**ekaraj, Mi ricevis la taskon enkonduki vin en la temon de la kongreso, nome: Dio estas amo.

Fakte, en mia espereble diskutveka prelego, mi ne ekzakte pritraktos tion. Mi intencas iomete rondiri la signifon de la kristana amo, en ĝiaj variaĵoj, por kompreni kion ĝi ne estas, kaj kion ĝi estas, ĝian ĉefan trajton kiu estas specifa al la Biblia kompreno.

amon, aŭ la karitaton, estas la t.n. “bona agado”, bone konata de la skoltroj. Fakte, ĝia funda signifo ofte estas tute alia ol oni povus teorie kompreni, t.e. montri amon al alia. Tiu plejofta signifo estas, kolekti al mi bonajn poentojn por kompensi la malbonajn poentojn kiun mi amasigis per miaj malbonaj agadoj. Sed, en tio, la objekto de la amo, de la ama agado, daŭre estas mi mem, kaj certe ne la amata persono, pli ĝuste la helpata persono.

## La kristana amo: enkonduko

Enkonduka prelego de Philippe COUSSON, FR,  
dum la ekumena kongreso en Pelplin 2007

Amo en la moderna kompreno estas io, kio falas sur vin. Oni enamiĝas, kaj ofte pli poste, oni eksamiĝas. El la du ĉefaj elementoj karakterizoj de tiu tipo de moderna amo estas unue la individuismo, eĉ ĝis egoismo. Kio validas estas mi mem. Temas pri tio, kion mi sentas. Temas pri tio, kio al mi plaĉas. Se la objekto de mia amo ne plu taŭgas al mi, se el ĝi aŭ el li aŭ el ŝi, mi ne plu ricevas bonaĵojn, mi facile asertas ke mi ne plu amas tion aŭ tiun. La decida faktoro estas mi mem.

Kaj, iamaniere kontraŭdire, la alia ĉefa elemento estas senrespondeco. Mi ne kulpas pri enamiĝo, kaj ankaŭ pri eksamiĝo. Tiu sento apartenas al kontingenteco. Mi ne mastras ĝin.

Alia ĉiutempa maniero kompreni la

Tiuj du manieroj agi kaj kompreni la amon, la karitaton, la almozon por islamanoj, ekzakte similas, ĉar ili celas la individuon mem kiu agas. Kaj tiu amo ne



Philippe COUSSON prelegas

estas, ne povas esti, la kristana amo. Oni ne amas kiam oni celas sin mem.

Alia kompreno de la amo, kiu ne korespondas al la greka vorto uzata en la Biblio, havas alian signifon. La amo kiel eros, celas kunfandiĝon de la individuo kun la diaĵo. Tio ankoraŭ daŭras, kiam oni parolas pri fandiĝa amo.

***Oni ne amas  
kiam oni celas sin  
mem.***

Kaj tio memorigas al mi unu karakterizon de la religioj elirintaj el Hindio, ĉu hinduismo, ĉu budhismo. Ĝi estas la ne-dueco. Ĉio estas en Dio, kaj Dio estas en ĉio. Kaj la celo de la multaj vivoj estas eniri samsaron, la kunfandiĝon en la grandan tuton, en la diaĵon. Tiuj sistemoj negas la individuojn. Kaj ĝuste tiu negado de la individuo ne povas taŭgi por kristanoj.

Ĉar por kristanoj, la plej grava afero estas ke ĉiu estas iu, ke ĉiu individuo ekzistas, dise de la alia. Kaj ankaŭ ke Dio mem estas iu alia, ke Dio estas LA Alia. Kaj ke tio, kion serĉas Dio ĝis la fino, ĝis la pasiono, tio estas la renkonto kun la homoj, kun la homo, kun ĉiu homo, kun vi kaj kun mi.

Sekve la amo inter homoj estas tiu renkonto de individuo kun la alia, la amo celas la alian, ĝuste ĉar ĝi estas alia.

Kaj tie mi citos la versiklon, kiu por

mi estas la plej grava en la tuta Biblio: *“Ĉar Dio tiel amis la mondon, ke Li donis sian solenaskitan Filon, por ke ĉiu, kiu kredas al li havu eternan vivon.”*

Jam de la komenco, la amo estas en la mondo, ĉar Dio amas la mondon, ĉar nek la mondo estas Dio, nek Dio estas la mondo, sed ili ekzistas aparte, kaj Dio amas la mondon, kaj en la mondo Dio amas ĉiun homon, ĉiun, kaj vin ankaŭ.

Kaj amo postulas reciprokecon. Sed, ĉar Dio amis la homojn, li kreis ilin laŭ sia bildo, kun libereco. Vera amo ne povas esti devigata. La homo do estas libera ami Dion aŭ ne. La libereco de la homo estas tia: ami aŭ ribeli. Kaj multaj homoj, tuj, plejmultaj homoj, preferis ami sin mem ekskluzive ol ami Dion. Ili rifuzas la amon de Dio. Kaj la rezulto por la homo fariĝis sklaveco. La homo kiu celas nur sin mem, servas al tirana mastro. Kaj tiu celo estas neatingebla celo. Kaj la homo ĉiam mistrafas la celon. La homo pekas. Eĉ, ĉar li vidas la rezulton de sia konduto, kiam la homo volas reveni al Dio, li daŭre celas sin mem, kaj sian sorton, kaj ne eliris el tiu nun diabla cirklo. Ĉar la homo ne kapablas mem kompreni ke Dio postulas nenion, ke Dio amas la homon, ĉiun homon.

Kaj la ĉefa atesto pri la amo de Dio al la homoj estas la veno, vivo, morto kaj releviĝo de Jesuo Kristo. Tio videblas ekzemple en Johano 13, kiam Jesuo antaŭ ol morti, lavas la piedojn de siaj disĉiploj, la teksto diras, ke li *“amis ilin ĝis la fino”*, t.e. ĝis la fina limo, ke ami pli ne eblas. Tiel estas la granda amo de

Dio. Dio volas montri al la homoj, al ĉiu ke vere li amas lin. La pasiono de Jesuo, la kruco, estas en si mem paroloj de Dio

***Sekve la amo inter homoj estas tiu renkonto de individuo kun la alia, la amo celas la alian, ĝuste ĉar ĝi estas alia.***

en agoj por montri, por diri lian amon al la homoj. Ĉar la diferenco inter Dio kaj la homoj, tamen, estas granda, Dio devis plurmaniere enkarnigi sian vorton. Li tion faris per Jesuo Kristo, sed ankaŭ per la skribita parolo, la skribita vorto, per la Biblio. La Biblio estas revelacio de la amo de Dio al la homo, transdonita per homoj, enkarniĝinta en homaj atestoj. Kaj en Jesuo, per la enkarniĝo en homo, estis la pleneco de Dio kiu sin donas, kiu amas.

Nun ni troviĝas en la kerno de kristanismo.

Kaj kiam la homo komprenas la amon de Dio por li, li povas same ami Dion. Kaj tion demandas Dio. Se vi komprenis kiel, kiom, Dio vin amis, vi ne plu povas celi vin mem. Vi tiam amas Dion. El viaj tuta koro, tuta animo, tuta spirito, ktp. Neniam estis dirite, ke vi amu Dion por ricevi rekompencan, ke vi amu Dion ĉar se ne vi ricevus punon. Tiam vi celus vin mem. Sed estis dirite, ĉar vi estis

liberigita, por la Izraelidoj t.e. liberigitaj el Egiptio, vi amas vian liberiginton.

Al la disĉiploj estis petite, ke ili amu unu la alian. Kaj ke tio estos por la nekredantoj atesto pri la Evangelio, fakte atesto pri la amo de Dio mem. Gravas ankaŭ en tiu peto la vorto “alia”. Mi ne amas la kredanton, kvazaŭ li/ŝi estus mi mem, sed ĝuste ĉar li estas alia, kaj ke Dio amas tiun alian, kaj ke tiu alia same kiel mi amas Dion.

Kaj jam de la Torao, jam de la malnova interligo, jam de la malnova testamento, estas tiu ordono, tiu parolo: Amu vian proksimulon.



Vi certe memoras la demandon de la leĝisto en Luko 10: “*Kiu estas mia proksimulo?*” Kaj se vi bone memoras la parabolon, vi certe notis la jenon: la

***Ami, tio estas esti feliĉa pro la feliĉo de la alia, kaj zorgi kiam la alia havas zorgojn, fariĝi helpanta al tiu kiu bezonas helpon, esti malfeliĉa kun la malfeliĉulo.***

proksimulo ne estis la vundito, certe ankaŭ ne estis la leĝisto, ne la pastro, sed la Samariano, la fremdulo, la netuŝeblulo, la alia. Tiu Samariano zorgis pri tiu homo, pri kiu oni scias nenion. Lia zorgo estis celata al tiu homo.

La amo estas celata al la alia. Ami, tio estas esti feliĉa pro la feliĉo de la alia, kaj zorgi kiam la alia havas zorgojn, fariĝi helpanta al tiu kiu bezonas helpon, esti malfeliĉa kun la malfeliĉulo. Fakte eĉ, kiel konstatis la Abato Petro, fondinto de la komunumoj Emaus: amo estas ekstazo, t.e. tiro ekster si mem. Amo celas la alian. Amo estas divido kun la alia, amo estas interŝanĝo. Amo situas en la nuno. Amo postulas fidon. Amo al Dio kaj ankaŭ amo al la alia, al la proksimulo. Fidon al Dio, kaj al lia amo. Al lia amo por mi kaj por la alia.

Vi ankaŭ bone memoras la 13-an ĉapitron de la unua epistolo al la Korintanoj, kie estas kelkaj karakterizoj

de la amo, kaj vi certe konstatos, ke ĝi neniam celas la propran intereson. Prenu momenton por ririgardi ĉi tiun ĉapitron.

Kiam mi mistrafas la amon, mi mistrafas ĉion. Amo estas la motivo de ĉio. Amo estas la motivo de la kreaĵo. Amo estas la motivo de la homo. Dio estas amo, kaj ĉio estiĝis de la Parolo pro amo.

Mi volas fini per rimarko. En la dua ordono, en la dua parolo, oni aŭdas ke oni devas ami la proksimulon, sed oni ofte haltas ĉi tie, sed la frazo finiĝas per: “*kiel vin mem.*” Tio signifas, ke ankaŭ sin mem oni devas ami. Sed certe ne ĉar la propra sorto gravas ĉefe kaj precipe, principe kaj unue. La ĉefa kaj precipa afero, la unua kaj principa, estas la amo ricevita de Dio. Kaj ĝuste pro tio, ke Dio amis nin, amis vin, amis min, vi, mi, ni scias ke vi, mi, ni estas amindaj, ke ni, vi, mi estas valoraj. Se ni, vi, mi estas tiel valoraj en la okuloj de Dio, kiu amas nin, vin, min, ni ankaŭ devas ami nin, vin, min mem.

Por resumi:

- La fonto de amo estas Dio mem.
- La amo celas la alian, la feliĉon de la alia.
- La amo de Dio manifestiĝis al la homo per la skribita Parolo kaj per la Filo krucumita kaj releviĝinta.
- La kristana amo havu kvar celojn: Dion mem, la gefratojn en Kristo, la proksimulon, kaj la kredanton mem.

Mi dankas.

# Ĉu mi ne tutkore kantu?

Jaques TUINDER, NL


...

**L**a 12-an de marto pasis kvar jarcentoj post la morto de **Paul GERHARDT**, mondfama luterana poeto de ekleziaj kantoj. Kaj ankoraŭ ĉiam ni konas kaj flegas liajn kantojn, nelaste en la kristana medio de Esperantio. Indekse sub Gerhardt, Paul en *ADORU* oni trovas 15 kantojn, tradukitajn ĉefe de nia kara frato Adolf Burkhardt. Sendube, unu el la plej konataj estas *"Ho sankta kap', kronita"*.

Kio estas la sekreto de lia religia poezio, ke ĝi dum jarcentoj ne perdis eĉ eron de sia klara esprimovo? Por povi respondi al tiu demando, mi proponas skizi kelkvortan impreson pri la periodo, en kiu vivis kaj verkis Gerhardt.


En la unua duono de la deksepa jarcento Germanio travivis epokon plej malluman kaj malkulminan. La tri-dekjara milito (1618-1648) havis efikon detruan kaj senmoraligan. Ne nur pro la militado mem - tutaj vilaĝojn oni el-rabis kaj forbruligis; fekundaj kampoj

dum jaroj novalis - sed ankaŭ pro la eksplodo de epidemioj inter kiuj la pesto infere furiozis. Paul Gerhardt ĉi ĉion mem tre aktuale spertis, kiam en la jaro



1637 la Svedoj porforte elrabis lian naskiĝlokon, post kiam la pesto levis la kapon. Samtempulo raportis:

"Kiel brute oni traktis la preĝejojn; ili platbruligis ilin, forprenis la sonorilojn, faris la konstruaĵojn sterkejoj, ĉevalaj staloj kaj bordeloj. La altarojn ili misuzis kiel necesejojn. Sed kiom terure mizeras la vilaĝoj; oni iras dek mejlojn, sed homon ne vidas, nek bruton, eĉ ne paseron, eble jen kaj jen aĝan viron, infanon aŭ du maljunulinojn. La domoj plenplenas de inter si miksitaj mortintoj kaj kadavroj, pereintaj pro malsato kaj pesto. Eniĝis larvoj kaj vermoj, kiujn ekmanĝis hundoj kaj birdoj, ĉar troviĝis neniu por enterigi, kompati kaj priplori ilin."



Gimnazio de Sankta Aŭgusteno en Grimma (gravuraĵo el la 17-a jarcento; el Vikipedio)

Kvankam vaste obstaklis militaj cirkonstancoj, Gerhardt bone edukiĝis kaj solide instruiĝis. Li vizitis la latinan lernejon, en kiu oni tradicie parolis konsekvence nur klasikan lingvon. En 1628 li



ekstudis teologion en la Vitenberga universitato, elstara 'bastiono' de la luterana ortodoksio.

Nur en 1651 Paul Gerhardt unuafaje pastoris, en loko proksime de Berlino. Tiam li havis jam 44 jarojn. Tre verŝajne la milito ludis prokrastigan rolon. Ses jarojn poste oni vokis lin al ofico en la Berlina Nikolao-preĝejo. Ĝuste tie kaj tiutempe estiĝis la fruktodona kunlaboro kun la kantoro-orgenisto Johann Crueger, kiu muziknotumis grandan nombron da kantoj de Gerhardt.

En la tagoj, kiam Paul Gerhardt pastoris en Berlino, plej akre eksplodis batalo inter Luteranoj kaj Calvinanoj. Ili principe malpaciis rilate al la doktrinoj pri la Sankta vespermanĝo kaj la predestinacio. La elektoprince, kiu transiris al la Reformitoj, proklamis kelke da dekretoj, en kiuj li postulis ke oni agnosku en ĉio la instruadon de Kalvino. Li renovigis la tiel nomatan 'buŝuman edikton', kiu malpermesas reciprokan herezuligon publikan.

Gerhardt, kiu dum sia Vitenberga studoperiodo estis entrinkinta la spiriton de Lutero, daŭre kontraŭstaris, kaj sekve oni eloficigis lin. Multaj senrezulte advokatis favore al li. Bonŝance oni ne ekzilis lin, kaj finfine li ekhavis propran eklezian komunumon en la urbeto Luebben, kie li en la jaro 1676 mortis.

Ankaŭ en sia familia vivo Gerhardt multe mizeris kaj suferis. En 1655 li edziĝis al Anna Maria Berthold. De la kvin infanoj naskiĝintaj, kvar tre frue mortis. Lia edzino forpasis jam en 1668.

Pri la akraj teologiaj disputoj kaj ardaĵaj pamfletoj kontraŭ la Calvinanoj ni tute nenion retrovas en la kantoj de Gerhardt.

Li parolis mem pri 'konsolaj kaj ĝojaj kantoj'. Konsolo ne nur por la profunde suferantaj animoj kaj sennombraj el-saviĝintoj de la milito, sed ankaŭ por si mem. Malgraŭ ĉiaĵ ĉagrenoj kaj duboj li ĉiam per sia voĉo atestis la bonecon de Dio. Tion liaj samtempuloj rekonis, tion rekonis ankaŭ postaj generacioj.

Dietrich Bonhoeffer rakontas en siaj elkarceraj leteroj kiom da spirita apogo li spertis kaj ĉerpis el la kantoj de Gerhardt. Li parkeris ilin, ĉar en lia junaĝo la familio ofte ilin kantis. Sed nur kiel malliberulo, kun la morto antaŭ la okuloj, ili malkaŝas sian plenan signifon!

Nin fascinas vidi kiel Gerhardt unuflanke manifestiĝas fidela disĉiplo de Lutero, dum aliflanke lin karakterizas propraj novaj akcentoj. La tono fariĝas pli individua kaj intima. Lutero vokas nin en siaj kristnaskaj kantoj kiel komunumon kolektiĝi ĉirkaŭ la kripo kaj adori Kriston, sed Gerhardt igas nin preĝi: 'Ho, koro mia estu via kripo'. Sed malgraŭ tiu intima kaj foje mistika etoso, ĉe li ni ankoraŭ ne trovas la ofte tiom sukergustan tonon de la postaj pietistoj. Gerhardt parolas tre fortan lingvaĵon, kiu ade kaj ade referencas al la Biblio. Okulfrapas la multaj kantoj kiuj baziĝas sur psalmoj.

Ke tiuj kantoj en lia tempo estis tre popularaj kaj ŝatataj, klare montriĝas el la fakto, ke dum la konflikto kun la elektoprince pluraj gildanoj sin dediĉis al li. Liaj kantoj estis kompreneblaj por homoj de ĉiuj rango kaj stato. Al li ne plaĉis la virtuozaĵaj kaj patosaj metaforoj, kiujn utiligis famaj poetoj liatempaj. Sed kadre de konsciencie alstrebita simpleco de lingvo kaj bildo, li aperas al ni kiel




lirike muzikema poeto, kies tekstoj emfaze petas pri tio ke oni ilin voĉe kaj kore kantu.

Grandan ĝojon li, konsekvence spertis pro la kunlaboro kun Johann Crueger, kiu por multe da tekstoj komponis muzikon kaj poste ilin eldonis en la kantaro 'Praxis pietatis melica'. Ĉi tiujn muzikajn ekzercojn pri pieco oni eksterordinare ŝatis, kio klare esprimiĝis en sinsekvaj eldonoj. Post la forpaso de

Crueger, Johann Georg Ebeling transprenis ĉi taskon. La kantoj devis trovi sian vojon al hejmaj diservoj, ne unuavice al liturgia uzado en la preĝejoj. Nur en pli postaj tempoj la kantoj de Gerhardt eniĝis en la oficialajn ekleziajn preĝlibrojn. Kaj do ankaŭ en *ADORU* !

Karmemore al frato Adolf Burkhardt (heemskerk, 2.4.2007)

1. Ho Sankta Kap', kronita per pika dorno-kron',  
Sanganta kaj vundita, memvola ofer-don'!  
Vin mokas soldataro, dum vivo fluas for,  
Sed supre anĝelaro rigardas kun ador'.
2. Vin lasas ĉiu forto, paligas vin dolor',  
Alproksimiĝas morto, rompiĝas via kor'.  
Ho amo vere Dia! Vi mortas ja por mi!  
La peko estis mia, la punon prenis vi!
3. Sen vortoj mia koro por taŭga dank-esprim'  
Pri tiu mort-doloro, kompatu ja sen lim'.  
Mi restu via ĉiam, fidela ĝis la fin';  
Neniam, ho neniam mi ĉesu ami vin!
4. En mia lasta horo, Savanto, montru vin,  
Kaj ĉe la mort-angoro rapidu savi min:  
La brakojn etenditajn en kruca malhonor'  
Mi vidu malfermitajn por preni min al glori!



## Katedralo? Baziliko?

Kompiliis Siegfried KRÜGER, DE

Vojaĝantaj Kristanoj certe vizitas preĝejojn aliloke, ĉu katedralojn, ĉu bazilikojn. Kia estas la diferenco aŭ de kie venas la nomoj?

**Katedralo:** Nomo grekdevena, kathedra = seĝo  
Ĝi estas preĝejo de episkopa sidejo.

**Baziliko:** Nomo grekdevena, basiliké = reĝa halo  
Origine ne konstruaĵo kristana. Sed la kristana eklezio transprenis la formon de 3- aŭ 5-parta kolonhalo kiel navo, kun pli alta meznavo, heligita per propraj fenestroj.

# Heroldo de senkompromisa homeco

Pri la vivo de Přemysl Pitter de Karel Kraft

Rezumis Pavel POLNICKÝ, CZ

*Kein Sonnenstrahl geht verlohren. Aber das Grün, das er weckt, braucht Zeit zum Spriessen, und dem Sämann ist nicht immer beschieden, die Ernte mitzuerleben.*

Albert Schweitzer

*Neniu sunradio perdiĝas, sed la verdaĵo, kiun ĝi vekas, bezonas tempon por ĝermi kaj la semanton oni ne ĉiam privilegias ĝui la rikolton.*

Tradukis Karel Kraft

**E**n la ĉiutaga tumulto ni apenaŭ liberiĝas por enpeniĝi pri la loko, en kiu ni ĵus troviĝas kaj primemori ĝian historion. Se tia loko ne estas ofte rememorigata en ĵurnaloj, radio kaj televidilo, nur historiistoj nutras la intereson de nemultaj scivoluloj pri pasinteco de la ĉirkaŭo. Nu, kaj povas esti, ke eĉ homoj vivantaj surloke ne supozetas, ke antaŭ kelkdeko da jaroj okazis en ilia ĉirkaŭo io, kio meritis daŭran firmiĝon en la homa menso. Tian preskaŭ forgesitan lokon ligitan kun homo tutmonde memorata. Nur hejme longe prisilentigata. Nur modesta memortabuleto troviĝas depost kelkaj jaroj sur la muro de la kasteleto Ltiĝín, loko, kiu devus laŭte tamtami al ĉiu preterpasanto ĝian ateston.

La murtabuleto portas nomon de Přemysl Pitter. Kiam la bolŝevista reĝimo permesis al mi plenumi laboron kun ŝovelilo kaj eĉ stiri konstrumaŝinojn, tiam mi ofte preterpasadis tiun lokon kaj memoris la homon, antaŭ jaroj elpelitan el sia patrujo. Nenie

## Přemysl Pitter

21.6.1895, Prago, Ĉeĥio  
15.2.1976, Zuriko, Svisujo


- premiito per Merita kruco de la I-a klaso de la Federacia Respubliko Germanio
- portanto de la Plej altranga izraela ordeno
- honora doktoreco de teologio de la Zurika universitato
- Ricevanto de la ordeno de T.G. Masaryk in memoriam

oni tiam povis surmeti lian memorotabulon. Mi loĝis en domveturilo ĉe Velké Popovice ĉe Prago. Plurfoje mi preterpasis vilaĝon kaj kastelon Štířín kaj en liberaj tagoj mi baniĝis en proksima lageto kun romantika ĉirkaŭaĵo kaj en miaj pensoj mi revenadis al la okazaĵoj en la ĉirkaŭaj loĝlokoj antaŭ pli ol 30 jaroj, pri kiuj mi aŭdadis rakonti de la Pitteranoj, amikoj de Přemysl Pitter.

Přemysl Pitter nomiĝis la homo, kiu en la jaroj 1945 - 1947 postlasis sur ĉi tiuj lokoj profundan spuron en la vivo de siaj zorgatoj, plejparte judaj kaj germanaj infanoj. Tiam en ĉi tiu loko kulminis kaj larĝe aplikiĝis rikolto de liaj humanismaj ideoj kaj edukaj spertoj. La tiamaj historiaj renversaĵoj instigis lin en plena forto renversi tristan sorton de liaj zorgatoj.

Kio okazis en kastelo Štířín, situanta en samnoma vilaĝo Štířín sudoriente de Prago kaj en pluaj tri kasteloj tute apude, ankaŭ neniel pompe superantaj per siaj konstruaĵoj vilaĝojn Kamenice, Olešovice kaj Lojovice? La restado en ĉi tiu portempa kastela rifuĝejo fariĝis por kelkcento da suferantaj gejunuloj turnopunkto en ilia vivo. Přemysl Pitter, praga pedagogo kaj humanisto, militkontraŭlo, tuj en la unuaj tagoj kaj monatoj post la dua mondmilito lanĉis savan operacion kaj establis tie provizorajn hejmojn, vere

unikan rifuĝejon, zorgejon por suferantaj infanoj, senkulpaj viktimoj de la militado. Ĉi tiu operacio de Pitter estis nekutima kaj miriga pro la fakto, ke li sukcesis malgraŭ la administraj obstakloj arigi kaj kunvivigi judajn infanojn, revenantaj el la infero de naziismaj koncentrejoj kun la germanaj infanoj, ĝis tiu momento ĝismortaj malamikoj de judoj, sed nun suferantaj en la ĉeĥaj internigaj centroj komunan sorton kun ili.



## HEROO DE LA AMO pri Přemysl Pitter far Karel Kraft

Přemysl Pitter naskiĝis la 21-an de junio 1895 en Prago. Dum la unua mondmilito kiel aŭstria soldato li rifuzis partopreni la hombuĉadon kaj nur la abrubta ŝanĝo de la situacio sur la batalejo malhelpis plenumi pri li la verdikton de mortpafo. Tuj post la milito li ne revenis al mastreco de la familia presejo kaj li decidis dediĉi sian tutan vivon al humanismaj idealoj kaj al kontraŭmilita eduko kaj aktivado. Praktikante kristanajn idealojn kiel sendogma sekvanto de la biblia heredaĵo li arigis ĉirkaŭ si plej povrajn infanojn en la malriĉa praga kvartalo Žižkov. Por sia ideo konstrui en Žižkov hejmon por la malriĉaj kaj ofte nesufiĉe edukataj infanoj, ofte vagantaj tra stratoj kaj ŝtelantaj, li sukcesis akiri kunlaborantojn kaj subtenantojn kaj post kelkaj jaroj, en 1933, li sukcesis realigi sian planon kaj venigi la infanojn el la luata restoracio en ilian propran domon, kiu ricevis

nomon „Milíčův dům“ omaĝe al ĉeĥa religia reformisto Jan Milíč z Kroměříže. Lian laboron subtenis same entuziasmaj kunlaborantoj, inter ili svisa instruistino kaj interpretistino Olga Fierz, kun kiu li konatiĝis dum sia porpaca aktivado. Ŝi eĉ lernis la ĉeĥan lingvon kaj dum la tuta vivo ŝi helpis realigi la edukajn planojn de Pitter.

Post la jaro 1933 fuĝis antaŭ Hitler en tiaman Ĉeĥoslovakion multaj germanoj. Ankaŭ la infanoj de la rifuĝintoj trovis en Milíčův dům helpon. Dum la milito Pitter, sub minaco de fizika likvidiĝo en koncentrejo, kuraĝis sisteme subteni judajn infanojn, kiuj jam ne plu rajtis viziti sian Milíčův dům, per nutraĵoj kaj alimaniere.

En la jaro 1945 finiĝis la milito kaj el koncentrejoj revenadis restintaj judaj infanoj, kiuj plejparte scipovis paroli nur germane. Duaflanke suferis ankaŭ germanaj infanoj, nun perforte venigitaj en la tiel nomatajn „internigajn centrojn“. La malamo al la naziistoj tiam larĝiĝis kontraŭ ĉiuj germanoj. Oni taksas ke nur en Prago suferis ĉe mortolimo pro malsato kaj manko da sanflego ĉirkaŭ 1500 germanaj infanoj.

Pitter devis kontraŭbatali antaŭjuĝojn. Eble ankaŭ pro siaj agoj li ne trovis la necesan komprenon ĉe la popolo por la ideo establi rifuĝejon por la suferantaj infanoj. Preskaŭ absolutan nekomprenon renkontis lia zorgo pri la germanaj infanoj. Apenaŭ iu povas nunteme penetri sin en la tiaman atmosferon kaj kompreni, kian spiritan forton Pitter havis kaj devis uzi por kontraŭbatali la tiamajn antaŭjuĝojn kaj

malamon. Lia humanismo komandis: Kopiane la agojn de SS-anoj (naziistaj elitaj trupoj), ni desupreniĝas al ilia nivelo.

Kaj en tiu momento montriĝas la alta humaneco kaj majstra pedagogia lerteco kun kapablo persvadi kompatemajn homojn al kunlaboro kaj subteno. Inter ili elstaras Olga Fierz, kiu ekde la jaro 1926 kunlaboris kun Pitter kaj ĉi-momente ŝi oferis plene sian vivon al infanoj. La tuta operacio „Kasteloj“ povis efektiviĝi nur per senlima engaĝiĝo de Pitter kaj nelacigebla helpo de liaj kunlaborantoj kaj de ekstera helpo de simpatiuloj kaj donacantoj. Neniun helpon ricevis li de la ŝtato, male li devis kontraŭi multajn malamikajn ofendojn kaj provojn puni lin pro kontraŭleĝa agado. Ekzemple en tiu tempo la germanaj infanoj ne rajtis esti subigitaj al normala instrua proceso. Li mildigis la nehumanan ordonon kreante „horojn de rakontado“. Post kiam oni sukcesis trovi por ĉiuj infanoj gepatrojn aŭ parencojn aŭ certigi al ili novan hejmon, la operacio „Kasteloj“ en la jaro 1947 finiĝis.

Tiam jam super la „Milíčův dům“ ŝvebis pezaj nuboj kaj post kelkaj monatoj komunistoj sukcesis transpreni ĉiun politikan potencon en Ĉeĥoslovakio. La eduka laboro en la humanisma kaj kristana atmosfero fakte ne povis daŭri plu. Oni limigis al Pitter lian edukan aktivadon kaj ankaŭ paŝo post paŝo multiĝis la ordonoj, kiuj malfaciligis la edukan laboron de la „Pittrovanoj“. La publiko ne estis tiam preparita por taksi sen antaŭjuĝoj la

valoron de ilia laboro. Pitter mem saviĝis somere de la jaro 1951 antaŭ la certa enprizoniĝo en komunistan malliberejon per fuĝo al okcidentaj landoj. Dek jarojn li laboris en rifuĝejo Valka en Germanio en medio, kiu prezentis por miloj da rifuĝintoj el orientaj landoj de Eŭropo ian specon de savpunkto kun ĉiuj negativaj de la interhomaj rilatoj, kiujn tia amasiĝejo kun neklaraj perspektivoj prezentas por la estonto de homoj, senigitaj de sia hejma medio. Kaj Pitter ankaŭ tie plenumis dum dek jaroj sian evangelian mision, kvankam li povintus komforte vivi en Svisujo. Tien li foriris en la jaro 1961 kaj plue plenumis sian misian taskon kune kun sia tutviva kunlaborantino Olga Fierz ĝis sia morto en la jaro 1976.

Ja nemultaj komprenis liajn altajn humanismajn horizontojn, kiuj gvidis

lian konduton. De ne multaj komprenata tiam, li restas ĝenerale ne aplaŭdata eĉ nun, tial ni ne miru pri nesufiĉa informado pri lia disradiana ekzemplo. En ombro de publika scio kaŝiĝas la honora doktoriĝo ricevita de la Zurika universitato kaj la honorigo, kiun iniciatis „liaj infanoj“ per planto de arbo, kiun li rajtis plenumi en Aleo de la justuloj en Jerusalemo. UNESKO proklamis la centjaran datrevenon de naskiĝo de Přemysl Pitter monda kultura datrevenon.

Se Vi volas aĉeti la libron de Karel Kraft *HEROO DE LA AMO* pri Přemysl Pitter, skribu al Pavel Polnický (adreso sur la dua paĝo de Dia Regno). Prezo + sendokostoj – 12 EUR. Pagu al konto poln-m ĉe UEA.




---

## Preskribo

Mu Binghua, Ĉinio

**I**un tagon mi sentis min malsana. Mi tuj iris al biblioteko kaj prunteprenis ekzempleron de gvidlibro pri medicino por legi.

Mi rapide foliumis la parton, kiun mi devis legi, kaj poste daŭrigis mian legadon de aliaj partoj. Kiam mi legis la enhavon pri ĥolero, mi ekkonsciis, ke mi suferis tiun malsanon jam antaŭ kelkaj monatoj. Tio kompreneble metis min en grandan timon...

Plue, mi volis scii, kiujn malsanojn krom la



ĥolero mi ankoraŭ suferas. Mi do laŭvice laŭ la enhavtabelo legis la tutan gvidlibron. El tiu tralego rezultis, ke escepte de hidropso ĉe genuo preskaŭ ĉiujn malsanojn mi suferas.

Mi estis tiel maltrankvila, ke mi tien–reen paŝis tie en mia ĉambro. Mi asertis, ke mi jam havas eblecon liveri min kiel malsanan ekzemplon al moderna medicino, multsignifan. Mi planis eĉ paroladi en medicina kolegio: ”Gestudentoj! Por vi ne necesas plu eniri hospitalon por praktikado, ĉar mi mem vere estas malsanulejo, kie troviĝas diversspecaj malsanoj; nur min serioze diagnozinte kaj zorge kuracinte, vi ĉiuj certe povos ricevi diplomon por esti kuracisto.

Mi toleris nenian prokraston, por ke mi estu certa pri tio, kiom longan tempon mi vivos. Mi volis fari unufoje sinprognozon. Mi serĉis mian pulson, sed foje ne trovis ĝin. Iom poste mi miris, ke por mi la pulsobato nombras eĉ po 140 fojoj minute! Sekve, mi denove movis mian manon por tuŝi mian koron, sed, kiel ajn, neniel fingrumis ĝin! Mi tute konfuziĝis kaj estis pala pro timo. Nur unu momenton poste, mi fine reakiris racion kaj konkludis, ke la koro ĉiam povas resti ĉe sia loko kaj ke mi ne trovis ĝin nur pro manko de mia trovo...

Mi ne intencis reiri al la biblioteko por konsulti alian fidindan libron de medicino, ĉar mi persone spertis ke, dum la irado al la biblioteko, mi estis feliĉulo, sed, elbibliotekiĝinte kun la pruntita gvidlibro, mi tamen fariĝis maljunulo kun pluraj malsanoj.

Kion fari? Mi decideme turnis min al mia bonkonata kuracisto. Li estas ankaŭ mia malnova amiko. Apenaŭ mi eniris lian hejmon, mi petis; ”Kara amiko! Mi ne diras al vi, kian malsanon mi nun suferas, kaj mi volas diri nur, ke baldaŭ finiĝos mia juna vivo. Helpu min!”

La kuracisto faris detalan diagnozon, tuj sidiĝis ĉe tablo kaj skribis ion sur paperfolio. Li kun rideto ĝin donis al mi. Antaŭ ol rigardi la folion mi metis ĝin en la poŝon. Mi urĝe iris al apoteko kaj transdonis la preskribon al la apotekisto.

Li ekrigardis la preskribon kaj afable ĝin redonis al mi. Nur tiam mi vidis, ke sur la preskribo origine estis skribite:

- porcio da fritita bifsteko kaj botelo da biero (ĉiutage trifoje)
- kuru je minimume dek mejloj (ĉiumatene unufoje)
- ne per tiaj aferoj, kiujn vi ne komprenas, ŝarĝu vian cerbon.

Laŭ tio mi faris kaj faras. Mi sane vivas ĝis hodiaŭ, laŭ tiu sincera konsilo de la kuracisto, kiu savis mian vivon, psike malsaniĝintan.

☞



# IMPRESOJ

DE LA 18-a EKUMENA ESPERANTO-KONGRESO

60-a de IKUE / 57-a de KELI/ 8-a JET (Junulara Esperanto-Tendaro)

Temo: Dio estas la amo ...1 Joh. 4,16  
La ĉefa donaco de Jesuo- kaj ni ...?

Raportis Els van DIJK-KUPERUS, NL

**L**a 18-a Ekumena Esperanto-Kongreso okazis en Porpastra Alta Seminario en la pola urbeto Pelplino, situanta 50 kilometrojn sud-okcidente de la havenurbo Gdansko en la regiono Koĉevio. La konstruaĵo apartenas al parto de post-ciceriana komplekso de monaĥejo el la 13-a ĝis 14-a jarcentoj. Al la komplekso apartenas la plej granda gotika katedralo en Pollando kaj bela ĝardeno. Ducent metrojn de la kongresejo estas bela palaco de la dioceza episkopo kun granda ĝardeno en kiu troviĝas interalie statuo de Gutenberg. La dioceza muzeo posedas la ununuran ekzempleron (faksimilon) en Pollando de la duvoluma Biblio de Gutenberg.



La interno de la baziliko



Kongresa manĝejo

La junuloj loĝis kaj manĝis en la mezlernejo je distanco de 500 metroj de la kongresejo. La plej gravaj organizantoj de la Loka Kongresgresa Komitato estis Jadwiga

Wasiuk kaj Edward Kozyra. Krome entuziasme kunlaboris pluraj helpantoj. Per malgranda aŭtobuso oni prizorgis la transporton inter la stacidomo kaj la kongresejo kiu situis je promendistanco de 15 minutoj. En la bele presita kongreslibro aperis la nomoj de 8 Honoraj Protektantoj kaj la plej eminenta Protektanto estis la urbestro de Pelplino, kies salutvortoj troviĝas en la kongreslibro.

Pro la abundeco de la programo mi ne mencias ĉiujn programerojn. La raporto fariĝus tro ampleksa.




Jam **vendredon** (20-07-07) alvenis gekongresanoj sed sabato estis la plej grava alventago.

Preskaŭ ĉiu mateno komenciĝis per Sankta Meso kaj poste sekvis Ekumena Matenpreĝo. Okazis Tagmeza Preĝo kaj la tago finiĝis per komuna Vesperpreĝo. La komuna kantado estis fiksita ero de la programo.

Bedaŭrinde partoprenis malmultaj KELI –anoj. Ni kontribuis laŭ fortoj al la programo.

**Sabaton** vespere bonvenigis nin pastro Bernhard Eichkorn, la grava instiganto de la kongreso. Ni aŭskultis eksplikon pri la programo kaj kompreneble ni kantis. *ADORU* estis la gvidlibro dum la tuta semajno.

La urbo Pelplino sin prezentis fine de la vespera programo per lumspektaklo pri la urbo.



Bernhard EICHKORN

**Dimanĉon** okazis Sankta Meso en la Baziliko kaj posttagmeze estis la Ekumena Kongresa Diservo denove en la Baziliko. Philippe Cousson predikis. Interesa programero okazis en la biblioteko. Fakulo montris la belan ekzempleron de la faksimilo de la Biblio de Gutenberg.

Bona ideo estis la Esperanto-kursoj dum la tuta semajno laŭ diversaj niveloj.


La oficiala malfermo de la kongreso okazis dimanĉon vespere.

Post la enkondukaj vortoj de la IKUE-pre-

zidanto Miloslav Šváček salutis nin arda oficialuloj kies afablaj vortoj estis tradukitaj en Esperanton. Salutis interalie la reprezentanto de la Pola Sejmo, nia KELI-prezidanto, la prezidanto de TOLE, la prezidanto de la Pola IKUE-sekcio, la prezidanto de la konsilantaro de Pelplino, la reprezentanto de la Ĉeĥa IKUE-junularo. Poste sekvis la salutoj de la landaj reprezentantoj. Partoprenis proksimume 200 gekongresanoj el 18 landoj.

La posta muzik-poezia programo imponis pro la talentoj de la polaj gejunuloj. Sin prezentis gelernantoj de la Muzika Lernejo, la Liceo kaj de la Ligitaj Lernejoj n-ro 2, ĉiuj el Pelplino. Deklamis kaj kantis junulinoj de la Esperanto-grupo “Kvarope”. La programo enhavis klasikan pianmuzikon, kantojn kaj poemojn en Esperanto.

**Lundon** prelegis Philippe Cousson pri la ĉefa temo de la kongreso: “Amo”. Poste estis ebleco aŭskulti 3 prelegojn sinsekve: pri la Ortodoksa vido de la Kristana Amo; Amo kredo por nia tempo; Bernhard Eichkorn disdonis kaj



La ekumena diservo.

P COUSSON kaj B EICHKORN



Prof. Bojidar LEONOV,  
Prezidanto de TOLE

klarigis kajeron kun Bibliaj versikloj: "Amo en la Biblio".

Posttagmeze estis unu el la prelegantoj Siegfried Krüger. Li parolis pri la agado de Jacques Tuinder: "Evidente - praktika amo por blinduloj". La prezidanto de IKUE lanĉis bonan ide-

on nome: la Ĉeĥa IKUE-sekcio eldonis libron kun la titolo "Ĉeĥa kuracisto en la koro de Afriko". Li disponigis la monsumon de la vendado de la libroj surloke al "Evidente".

La vespera programo nomiĝis: "Koĉevio prezentas sin - koncerto de folklorensemblo "Modraki". "Modraki" signifas "Cejanoj". Ĝi konsistas el gelnantoj de la Ligitaj Lernejoj n-ro 1 en Pelplino. Apartenas al ĝi 37 infanoj kaj 3 plenkreskaj muzikantoj. La infanoj prezentis koĉevian folkloron. Dancante kaj kantante ili montris la belajn folklorajn vestaĵojn. Plurajn kantojn ili

kantis en Esperanto.

**Mardon** okazis krom diversspecaj prelegoj pri religiaj temoj ankaŭ inform-prelego pri la ekskursoj al Malborko kaj Gdansko. La celo de la duontaga ekskurso estis la urbo Malborko kaj pli precize la Parko de la Mondo. Ĝi situas inter grandaj amasloĝejoj el la socialisma periodo. En la parko troviĝas grandaj ŝtonoj kun Esperanto-surskriboj kaj donacitaj de Esperanto-klubo el diversaj landoj. Dum solenaĵo oni inaŭguris obeliskon donacitan de loĝantoj de la Usona urbo Seattle. La inaŭguron plenumis la prezidantoj de KELI kaj IKUE kaj profesoro Jerzy Dobrzyński. Partoprenis reprezentantoj de la urbo. Sur la obelisko estas skribita: "Paco regu sur la Tero" en pluraj lingvoj, inter kiuj estas Esperanto.

Post la solenaĵo ni vizitis la faman kastelon de Malborko. Feliĉe ne plu pluvis. La kastelo estas la plej granda gotika brikfortikaĵo en la mondo. Komence de la 13-a jarcento komenciĝis la konstruado. Ĝia historio respegulas la politikajn kaj armeajn konfliktojn inter la teŭtona armeo (germano) kaj la pola - litova armeo. Ĉiĉeronoj gvidis nin tra la impona kastelo inter amaso da turistoj.



Aŭskultantoj kaj kantantoj



La Malbork-kastelo

Ĝi vere valoras viziton.

Vespere sin prezentis kaŝuba infan - kaj dancensemblo “Słunôszka”(Sunetoj) el la Bazlernejo n-ro 2 en Kartuzy. Rakontanto rakontis pri la kaŝuba lingvo kaj snuftabako. Ambaŭ karakterizas Kaŝubion.

**Merkredon** estis la tago de la tuttaga ekskurso. La plej grava celo estis la granda urbo Gdansko. Interesa por ni, nederlandanoj, estis la fakto ke Gdansko apartenis al la ĉeno de havenurboj en la mezepoko, nomitaj “Hansaj-urboj”. La domoj ĉe la rando de la malnova urbo-kvartalo estis konstruitaj el ruĝkoloraj kvarangulaj brikoj kiel en Nederlando. La komercistoj transportis grenon al Amsterdam kaj kiel balaston en la ŝipo ili reportis tiujn brikojn. Impresis min la vizito al la monumento de “Solidareco”, konstruita rememore al la laboristoj de la ŝipfarejo, kie estis fondita la unua sindikata movado en Pollando.

En kvartalo de Gdansko ni vizitis la katedralon kaj ni povis promeni en la bela parko. La celo de la lasta parto estis Sopoto, familia banloko ĉe la Balta Maro. La vespera programo ofertis orgenkoncerton en la Baziliko kaj poste sidis la gekongresanoj apud fajro kaj ĝuis rostitajn kolbasojn en la ĝardeno.

**Ĵaŭdon** estis la jarkunveno de IKUE



Ĉe la fajro rostante kolbasojn

kaj KELI. Posttagmeze estis ĉiuj invititaj prezenti ion sur tablo, per afiŝoj, prelege. Vespere okazis Sankta Meso kaj Evangelia Diservo. Bedaŭrinde nia membro pastoro Ericas Laiconas malsaniĝis. Tial gvidis kaj predikis Philippe Cousson helpe de Els van Dijk.

Vespere ni denove ĝuis artan programon. Profesia muzikisto (s-ro Marko Marczewski) ludis la klarineton kaj junulinoj de la Esperanto-grupo “Kvar-



Gaja triopo: Pavel POLNICKÝ, Els van DIJK-KUPERUS, Samuel GAILLARD

ope” deklamis la Hindan legendon: ”Estu benata” de Henriko Sienkiewicz en traduko fare de Anton Grabovski.

**Vendredon** okazis la kutima fotografado. Philippe Cousson prelegis pri “La aŭtoritato en la Protestantaj Eklezioj”. La posta diskutado estis interesa kaj klare montriĝis la malsamaj opinioj inter ni.

La posttagmezo estis libera por preparo al la vesperaj prezentadoj de la Adiaŭa Vespere. Alois Eder gvidis tion helpe de nia estrarano Samuel Gaillard. Alois estis la gvidanto de la junularo. Mi partoprenis nur la komencon de la vespera programo pro mia forveturo hejmen.

Grandan dankon ni ŝuldas al la LKK kaj Bernhard Eichkorn por la riĉenhava, bone preparita kongreso. ☺

# Protokolo de la jarkunveno de KELI Pelplin, la 26-an de julio 2007

Partoprenis la jenaj estraranoj: Philippe Cousson, Els van Dijk, Siegfried Krüger, Bengt-Olof Åradsson, Pavel Polnický, Samuel Gaillard.

8 membroj kaj 6 estraranoj.

- 1 Malfermo.** La prezidanto, Philippe Cousson, gvidis solenan momenton per mallonga matena preĝo (*ADORU* 114; 114.6; 120:1,2; 120.5) Poste li oficiale malfermis la kunvenon per martelfrapo.
- 2 Elekto de la kunprotokolantoj.** Gerda Dercks el Nederlando kaj Maria Laszlo el Rumanio estis pretaj kontroli la protokolon.
- 3 Fikso de la tagordo.** Neniu ŝanĝo.
- 4 Komunikoj.** Estis salutoj nome de kelkaj membroj kiuj ne partoprenis: el Germanio, Svedio, Usono, Hungario, Nederlando.
- 5 Funebra memorigo.** s-ro H. Gerling (Germanio), s-ino E. Walder (Svis-

lando), s-ro D. Withey (Britio), s-ro A. Védine (Francio), d-ro B. Szemök (Hungario).

Starante ni rememoris la forpasintajn membrojn.

- 6 Sekretaria jarraporto.** La sekretariino ricevis malmultajn informojn. En la kunveno estis kelkaj aldonoj. Bengt-Olof Åradsson informis ke la Sveda KELI-sekcio okazigis Diservon kadre de la kongreso de la Sveda Esperanto-Federacio (100 jariĝo de S.E.F.). Samuel Gaillard el Francio menciis ke li jam dum 3 jaroj organizas kelkajn tagojn antaŭ Kristnasko kunvenon en Clermont-Ferrand kun romkatolika klubano. Ĝi estis du-lingva: Esperanto-Franca. “*ADORU*” estis uzata. Samuel havas kontaktojn kun juna pastoro el la suda DR-Kongo. La Finna sekcio havas novan kassistinon. La Biblio-stoko troviĝas ĉe Bernhard Eichkorn. La sveda mem-

bro Åke Ahlren menciis siajn kontaktojn kun esperantistoj en DR-Kongo. La ĉeĥa sekcio malmulte aktivis. En Germanio okazas regule diservoj en Esperanto. La membroj akceptis la raporton per aplaŭdo.

- 7 Kasista jarraporto.** La kasisto eks-



La estraro dum la jarkunveno: S. KRÜGER, S. GAILLARD, P. COUSSON, E. v DIJK, P. POLNICKÝ:

plikis kio estas “Aktivoj”. Li petos al Ericas Laiconas el Litovio resendi la restantan monsumon de la “Esperanto Misio”-kaso al la kasisto de KELI. Pavel Polnický havas kason por la elspezoj de la sendado de “Dia Regno” kaj la pago al la presejo.

Monrimedoj: Kuranta konto de Kazimierz Leja. Temas pri pruntedonita mono kiun la iama presisto jam repagis.

La Dana interreta Biblio-vendejo aĉetis 700 Bibliojn. La kapitalo malaltiĝis sed la librostoko altiĝis kaj libroj apartenas al la kapitalo. Heredaĵo kaj librovendado altigis la gajnon.

Kreditoroj. Britoj kaj Hungaroj havas monsumon en la KELI-kaso.

Transitaĵoj. Temas pri la antaŭpagitaj kotizoj.

Ni ne altigu la kotizon.

### **8 Raporto de la kaskontrolantoj.**

Horst Hub kaj Karl Heinz Schaeffer kontrolis kaj rekomendis malŝarĝi la kasiston. La membroj aprobis per aplaŭdo.

### **9 Buĝetoj.**

En 2007 restis la estraraj kostoj samaj. La kostoj de la presisto estonte eble plialtiĝos kaj la gajno supezeble malpli altiĝos.

### **10 Raporto de la redaktoro.**

Li ŝatas ricevi pli da kontribuoj. Éva Farkas kontrolas la lingvon. En 2009 ni rememoros la 100-jariĝon de “Dia Regno”. La redaktoro petis la membrojn sendi al li interesaĵojn el malnovaj ekzempleroj de “Dia Regno”. “Nia Historio” finiĝis en la jaro 1961. Ĉu ĝi eble povus ape-

ri en Vikipedio? Kiu povos daŭrigi nia historion eble pere de artikoloj?

### **11 Estrarelekto.**

Britta Rehm ne plu estis reelektebla. Dum multaj jaroj ŝi estis fidela estraranino. Bengt-Olof sendos nome de KELI florbukedon. Reelektitaj estis Els van Dijk, Jacques Tuinder, Samuel Gaillard, Philippe Cousson. La membroj konsentis ke Pavel Polnický transprenos la sekretarian laboron. Els restos en la estraro por trakti kun la KELI-aferoj en Nederlando. La membroj konsentis.

### **12 Kongresplanoj.**

Pavel Polnický proponis organizi KELI-kongreson en 2008 en Slovakio en Hotelo Esperanto. La hotelo troviĝas en la vilaĝo Pribylina nordorienta de Liptovský Mikuláš kie haltas internaciaj rapidvagonaroj. La vojaĝo el Praha estas 6 horoj. El la sudo iras vagonaro el Bratislava. La vilaĝo situas proksime al la “Alta Tatro”. Apud la hotelo troviĝas malgranda subĉiela muzeo kies preĝejo estos je nia dispono. Pli da informoj aperos en Dia Regno. La Universala Kongreso okazos en Nederlando en 2008 (19-26 julio). Kiam do komenciĝu la KELI-kongreso?



Partoprenantoj dum la jarkunveno

Eble de lundo ĝis lundo? Provizoraj prezoj: orientlandanoj aliĝkotizoj dependante de la periodo; 10, 20 kaj 30 Euroj; kongreskotizoj: 120 Euro. okcidentlandanoj: 40, 50 kaj 60 Euroj aliĝkostoj; kongreskotizoj: 1-lita ĉambro 270 Euroj, 1 lito en 2-lita ĉambro 240 Euroj. La kalkulado estas farita surbaze de 40 partoprenontoj el kiu duono el la Okcidento. La membroj akceptis la proponon kaj la kongresan temon: “Dia Regno”. Ekumena kongreso en 2009. La Ekumena Komisiono ricevis 2 proponojn. Philippe Cousson proponis organizi Ekuamenan Kongreson en Poitiers kaj je vendredo, sabato kaj dimanĉo dulingvajn kolokvojn por teologoj rememore al Kalvin kaj Hilarius. Hilarius estis episkopo de Poitiers. La kongresejo estu la Romkatolika Teologia Seminario, la Dioceza domo havas 100 litojn krome troviĝas en la urbo kampadejo kaj hoteloj. Ebla temo: “La rolo de la teologio en la eklezio”. Por IKUE estis la propono ne alloga pro la IKUE-kongreso en 2010 en Parizo (100-jariĝo) kaj Kalvin. Profesoro Boĵidar Leonov de la Bulgaraj Ortodoksaj Esperantistoj (TOLE) proponis Karlovo en Bulgario 140 kilometrojn de Sofio. Estis propono sen detaloj kaj Bernhard Eichkorn vojaĝos tien por esploroj surloke.

### 13 Ideoj kaj sugestoj de la membroj.

La estraro proponis nomumi s-inon Nel van Iperen-de Vries el Nederlando honora membro de KELI. Dum multaj jaroj ŝi finance subtenis la kongresojn. La membroj konsentis. La aperigo de Jarlibro estas problema pro



Prepara estrarkunsido

la leĝo rilate al la protekto de la privateco. Eble ni publikigu nomon kaj adreson de unu persono po lando kiel reprezentanto papere aŭ eble interrete. Nun oni kontaktu la sekretarion aŭ matrikuliston. Pavel Polnický dissendas “Dia-n Regno-n”. Li povus enmeti landan informilon.

**14 Fermo.** La prezidanto fermis la kunvenon.

Protokolo: Els van DIJK-KUPERUS  
Kunprotokolantoj: Gerda DERCKS, Maria LASZLO

Estraro de KELI.  
Inter krampoj la fino de ĉies deĵorperiodo.

Philippe COUSSON: 2010 (prezidanto);  
Siegfried KRÜGER: 2008 (kasisto);  
Pavel POLNICKÝ: 2008 (sekretario);  
Bengt Olof ÅRADSSON: 2009 (redaktoro);  
membroj: Jacques TUINDER, Els van DIJK-KUPERUS, Irén BAGI, Zoltán SOMHEGYI, Samuel GAILLARD.

# Taoismo en Ĉinio

Hsu Chungmu, majode, Ĉinio

**K**iel konate, ekzistas Kristanismo, Islamo kaj Budaismo - tri ĉefaj religioj en la mondo. Sed en la nuna Ĉinio en la reala vivo, ankaŭ troviĝas Taoismo, ĝiaj fideluloj nur malpli tri religioj ol supere, fariĝis la kvara. Sub la unuigita gvidado de Popola Registaro, nun, la "Taoisma Ligo" estas establita en ĉiuj urboj.



Taoismaj ĉefaj signoj estas "Yin-Yang Taiji Tu" (hermetika kosma totemo) kaj "Ok Diagramoj" (vidu la bildojn) – fondita el la plej mal-

nova "Yi Jing"-libro. Centoj kaj centoj da jaroj, la unua simbolo fariĝis esenca totemo de grava sekto de ĉina religio kaj tradicia gimnastiko; la dua simbolo fariĝis ĉefa fondo de sortodiveno kaj diveni laŭ favora aŭspicio kune kun danĝero. Ankaŭ ĝi estis grava maniero de politika decido de antikvaj monarkoj, sed ne estis unika formo.

Post ili trapasis la purigan flamon kaj spertis ventojn kaj pluvojn, ili ambaŭ, estis vasta anima-kampo en ĉinaj dezertaj kamparoj.

Taoistaj pastroj opiniis ke la "Ok Diagramoj", ĝia ĉefa emblemo estis "la ĉielo kaj la tero" ktp., ĝi estis la plej

komenca fonto de ĉiu aperaĵo de natura mondo kaj la homara socio.

Taoismo estis la propra religio kiel ĉina Han-nacio, fonto el antikva sorĉarto. 142 jaroj post Kristo Han-Dinastio, Zhang; Daoling, establis ĝin. Aliĝantoj devis pagi kvin "Dou" (ĉina pasinta mezura unito, ĉirkaŭ 5 kg) rizoj. Tial ankaŭ diris "kvin Dou rizoj religio" Ĝi estis komenco en difinita formo. Ĝi kredis al Lao Zhi (Li Er) kiel papo honore nomiĝis "Tai Shai Lao Jung" (nesuperita Dio) – tiama fama Konfuzio (estis lia portreto en galerio de UN), konsultis al li. Lia ĉefa sankta, skribo estis "Lao Zhi Kvin-mil Vortoj" (alia titolo estis "moralo-klasikaĵo").

Poste, Zhang Jiao (? – 184j) disvolvigis ĝin. Ĝi nomiĝas "Paca religio". Ĝi fariĝis flago de tiama leviĝo de kamparanoj. Ge Hong (317j) skribis "Bao Pu Zhi" (iu nomo) ordis kaj priparolis la teorion de Taoismo. Ĝis nun, lia eliksiro-recepto ankoraŭ estas fama eliksiro de







Zhang Jiao sur ĉina poŝtmarko

ĉina popola fortiko kaj por kuraci malsanojn.

Dum la jaroj 420–532 Shong Monto Taoista pastro reformis ĝin kaj starigis novan Taoismon. Premsekve, suda Lu Monto Taoista pastro, ordis "Tri Kavernojn

Sankta-skribojn". La formo de Taoismo estis plenumita. Inter 617–1279, diversaj klanoj kunfluis iom post iom. Meze de tio, dum 1167j Wang Zhongyang fondis novan klanon. Lia disĉiplo Qiu Chuji atentiĝis de la unua imperiestro de la Yuang Dinastio – tre fama historia Chen Ji Si Han. Tial, Taoismo furoris sian plej bonan tempon. Dum la tempo de Ming Dinastio (1368 – 1644), la imperiestroj iom ankaŭ kredis al Taoismo, kaj ĝi respektis la titolon de "Nacia Religio". Ree, regis Ĉinion en animo.

En la jaro 1973, en elterigitaj historiaj objektoj de la "Ma Wang, Dui Hans-dinastio-tombo" de Hunan-provinco, oni trovis mankopiitan libron de "Lao Zi". Ĝi enhavis iom faktoron, de malluksaj dialektikoj. Fama instruisto Zhuang Zi heredis kaj disvolvigis al Lao Zi.

La doktrino de Taoismo, al ĉina klasika literaturo kaj arto ktp., precipe al ĉina "te-ceremonio" kaj "te-kulturo ĝis nun, ĝi ankaŭ estis profunda influa forto. Eĉ se ĉina Taoismo aŭ Budaismo, ambaŭ emfazis la "Ideo"-funkcion kaŭze de intelekta sublumo eniri al superhoma animstato, ĝuste tio estis "praktika kulturo" de Taoistaj pastroj. Ili opiniis ke, se iu atingis la nesupereblan animstaton, tiu fariĝos "feo".

Kiel baza spirito de okcidenta kulturo, de la komenco ĝis la fino, entenis en la "Malnova kaj Nova Testamento". La baza spirito de Taoismo, enhavis en la "Ok Diagramoj". Tre pensige: Ĝis nun, sur la nacia flago de Respubliko de Koreo estas "kvar diagramoj" kaj kosma signo. ☯

---



## Dankon



Al la membraro de KELI. Mia mano ne plu skribas tiel bone kiel antaŭe kaj skribmaŝinon mi ne havas. Ofte mankas la energio kaj inspiraĵo. Per tiu ĉi maniero mi volas tre kore danki vin pro la fakto ke vi nomumis min Honora Membro. Je distanco mi provas interesiĝi pri KELI kaj mi ĝojas ke ankoraŭ multaj membroj en la Orienta parto de Eŭropo aktivas.


Kun koraj salutoj kaj plej bonaj bondeziroj,

*Nel van Iperen*

# Sekvontjara kongreso - enkonduka informo

**L**a sekvonta KELI-kongreso okazos de la lundo 28 de julio ĝis la lundo 4 de aŭgusto 2008, por ke ankaŭ tiuj, kiuj partoprenos UK en Rotterdamo povus veni al Slovakio. Detalajn informojn kaj aliĝilon ni donos al 5-a n-ro de Dia Regno. Se vi tuj nun bezonos pli da informo mi estas preta tuj respondi al vi.

Pavel Polnický, sekretario




---

**H**otelo ESPERANTO troviĝas en vilaĝo PRIBYLINA proksimume 25 km nordoriente de LIPTOVSKÝ MIKULÁŠ, kie haltas eĉ internaciaj rapidvagonaroj.

Ĉirkaŭ la hotelo estas montaraj herbejoj, proksime estas videbla majesta monto KRIVAŔ, oriente leviĝas montaro VYSOKÉ TATRY (Altaj Tatroj). Tuj apude estas skanseno, subĉiela muzeo pri popola arkitekturo kun preĝejo.

Ciuj ĉambroj havas propran duŝon kaj necesejon, je nia dispono estas lifto, manĝejo, vintrinkejo kaj saloneto. Ĉi jare estas konstruata nova etaĝo kun pliaj ĉambroj por kongresaj programoj. ☞



# Cafebabel.com: Novaĵoj sur la reto en sep lingvoj

(mallongigita resumo de artikolo aperinta en Le Monde, 18 aprilo 2007)

Jerald VEIT, USONO

**E**ble ĝi ne estas la sola, sed certe ne ekzistas multaj tiaj retaj novaĵfontoj. [Cafebabel.com](http://Cafebabel.com) estas reteja revuo, kies ĉefa kaj okulfrapa karakterizo estas la fakto, ke ĝi estas en sia tuto legebla en sep lingvoj.

Ĉe [cafebabel.com](http://cafebabel.com) oni parolas en la franca, angla, germana, hispana, itala, pola kaj eĉ en la kataluna.

Ek de la hejmpaĝo sufiĉas simpla klicko sur flageto por atingi la tutan enhavon de la revuo en la koncerna lingvo. Multlingva laŭ naturo kaj koncepto, [cafebabel.com](http://cafebabel.com) nomas sin “la revuo de Eŭropo” kaj naskiĝis sub la signo de la Eŭropa Unio.

“Tamen,” substrekas la editora di-


rektoro Adriano Farano, “ĝi ne estas la Eŭropo de la instancoj, nek la Eŭropo de la leĝoj aŭ de la reguloj. Por ni Eŭropo estas antaŭ ĉio afero de la homoj. Per [cafebabel.com](http://cafebabel.com) ni volas atingi, ke oni povus legi pri sociaj kaj politikaj fenomenoj pere de eŭropaj okuloj.”

Kaj escepte de kelkaj artikoloj pri lokaj temoj, la tuto estas legebla en unu de la supre menciitaj sep lingvoj.

La projekto naskiĝis antaŭ ses jaroj danke al la programo Erasmus, la interŝanĝa programo por eŭropaj studentoj. Adriano Farano kaj Nicola Dell’Arciprete, du italaj studentoj, je tiu tempo troviĝis en Strasburgo ĉe la Instituto pri Politikaj Studoj. Ambaŭ havante la junan aĝon de 21 jaroj, ili havis la ideon lanĉi tuteŭropan amas-komunikilon por nova generacio de eŭropanoj, kiuj ne plu vidas la politikon sole laŭ la vidpunkto de sia nacieco.

En la komenco la revuo aperis nur en kvar lingvoj, nome la franca, angla, itala kaj hispana, kaj estis ĉefe la produkto de libervolaj redaktoroj, kiuj kunlaboris rete kaj plejparte estis partoprenintoj de Erasmus. Nuntempe la laboro fariĝis pli profesia kaj estas farata de deko de ĵurnalistoj kaj tradukistoj, kiuj ekde Parizo gvidas la kontribuon de ĉirkaŭ mil libervolaj kunlaborantoj tra tuta Eŭropo. Ilia celo estas eldoni altkvalitan transnacion publikajon kaj subteni la kreon de tuteŭropa publika opinio. ☪

“The Confusion of Tongues” by Gustave Doré



Doré Bible Illustrations • Free to Copy  
[www.creationism.org/images/](http://www.creationism.org/images/)

Gen 11:6-8 ...Rebeld, the people is one, and they have all one language. ... let us go down, and there confound their language, ... so the Lord scattered them abroad. ...

# Informoj

En oktobro okazos Esperant-lingva kolokvo pri bibliotekoj kaj arkivoj en la Aŭstria Nacia Biblioteko, organizita de ties Esperantomuzeo kaj Kolekto por Planlingvoj. La fakto, ke nacia biblioteko organizas kolokvon en la Internacia lingvo estas konsiderinda oficiala rekono de Esperanto flanke de ŝtata organizo. Tio meritas subtenon. Ni pro tio kore petas vin disvastigi la informon tra la interreto kaj publikigi ĝin en via revuo.

Nia planlingva spirita heredaĵo estas konservata en bibliotekoj kaj arkivoj. Ĉi-rilate bedaŭrinde ekzistas multaj problemoj, tro ofte nekonsciataj. Pro tio la Esperantomuzeo kaj la Kolekto por Planlingvoj de la Aŭstria Nacia Biblioteko, Vieno, aranĝos kun la subteno de UEA internacian kolokvon en Esperanto sub la temo:

## “Planlingvaj bibliotekoj kaj novaj teknologioj”.

La kolokvo okazos la 19-an kaj 20-an de oktobro 2007 sub teknike bonaj kondiĉoj en la nova sidejo de la Esperantomuzeo, Palais Mollard, Herrengasse 9, A-1010 Vieno.

La celo de la kolokvo estas prezenti la ĉefajn problemojn, kiujn frontas diverstipaj planlingvaj bibliotekoj kaj arkivoj kaj kiuj estas solvendaj. Jen la enhavo de la antaŭvidita programo:

- prezento de la aktuala situacio de la Esperantomuzeo kaj Kolekto por Planlingvoj
- informoj pri gravaj bibliotekoj kaj arkivoj
- utiligo kaj diskonigo de la ricxajxoj de la kolektoj
- problemoj de la modernigo de la kolektoj, i.a. per la utiligo de novaj teknologioj

La reciproka konatiĝo de la koncernaj respondeculoj, la komuna pridiskuto de la nuntempa rolo de niaj bibliotekoj kaj arkivoj, helpu al ni trovi konvenajn vojojn kaj metodojn por starigi kunlaboron kaj interhelpon.

Kore

Herbert Mayer



## Lilli Vikström

Lilli Vikström naskiĝis la 17/8 1918 in Hässlö, Svedio. Ŝi iĝis la 16-an de julio ege malsana pro koratako kaj akvo en la pulmoj kaj iris en malsanulejon, Sabbatsberg. Ŝia stato iĝis pli bona kaj iris al malsanula hejmo Solbacken, kie ŝi mortis la 1-an de septembro matene. Lilli lernis Esperanton de Anna Alamo (-Sandgren) kaj dum la unua KELI kongreso in Tostarp 1948 mi ekkonis ŝin. Dum multaj jaroj en la eklezio de Abrahamsberg ni havis kunvenon sabatvespere kaj tie ŝi helpis pri la servado. En mia hejmo en Solberga ni havis KELI kunvenojn. Lilli partoprenis diversajn naciajn kaj internaciajn kongresojn, kaj ekkonis multajn geamikojn. Ŝi estas funebrita de KELI kaj la Sveda Esperanta Asocio, la baptistaj eklezioj en pluraj landoj. La enteriga diservo okazos en baptista preĝejo Kungsholmen, kiun gvidos Sven Ohm.

Arne Lundkvist

- 1) *Ho granda Dio, kiam mi rigardas la mirindaĵojn, kiujn kreis Vi,  
Kaj ke senĉese Via amo ardas por teni ĉion en plenharmonia,  
Animo mia gloros Vin per kant', ho granda Di', ho granda Di'!  
Animo mia gloros Vin per kant', ho granda Di', ho granda Di'!*
- 2) *Pri Vi parolas la somera vento, kaj floroj odorantaj en kampar',  
Trilantaj birdoj en vespersilento, sennombraj voĉoj de la kreitar'  
Animo mia gloros Vin per kant', ho granda Di', ho granda Di'!  
Animo mia gloros Vin per kant', ho granda Di', ho granda Di'!*
- 3) *Miraklojn vidas mi en la Biblio, faritajn jam de tempo de Adam';  
Dum ĉiuj jaroj de mondhistorio ne ĉesis Via gracoplena am'.  
Animo mia gloros Vin per kant', ho granda Di', ho granda Di'!  
Animo mia gloros Vin per kant', ho granda Di', ho granda Di'!*
- 4) *Kaj kiam mi memoras pri la gloro de mia savo per la Krist-ofer',  
Mi klinas min kun adorad-fervoro, dankante Vin kun pura kor-sincer'.  
Animo mia gloros Vin per kant', ho granda Di', ho granda Di'!  
Animo mia gloros Vin per kant', ho granda Di', ho granda Di'!*
- 5) *Kaj fine falos ĉiuj tempvualoj, kaj bonvenigos nin Emanuel';  
Ravege sonos la anĝel-ĥoraloj; ekĝuos mi la gloron de l' ĉiel'.  
Des pli mi laŭde gloros Vin per kant', kaj dankos Vin, ho bona Di'!  
Des pli mi laŭde gloros Vin per kant', kaj dankos Vin, ho bona Di'!*

Ho granda Dio. ADORU 455. Svede: O store Gud.

## Ni konscias kaj akceptas

Ke nian ripozon ni ne trovas en la certeco pri tio kion ni konfesas,  
Sed en admiro pri tio kio nin trafas kaj kio estas donacata;  
Ke nian destinon ni ne trovas en indiferento kaj avideco,

Sed en viglado kaj ligiteco kun ĉio vivanta;  
Ke nia ekzisto ne kompletigas per tio, kiuj ni estas aŭ kion ni havas,  
Sed per tio, kio estas senmezure pli granda ol kion ni povas ampleksi.

Gvidate de tiu konscio, ni fidas je la Spirito de Dio  
Kiu superas ĉion kio disigas homojn  
Kaj kiu inspiras ilin al ĉio sankta kaj bona,  
Por ke, kantante kaj silentaj,  
Preĝante kaj agemaj,  
Dion ili honoru kaj servu.

Ni kredas je Jesuo, homo plena je Spirito,  
La vizaĝo de Dio kiu nin alrigardas kaj senkvietigas.  
La homojn li amis kaj estis krucumita  
Sed li vivas, preter la propran morton kaj la nian.  
Li estas nia sankta ekzemplo de saĝeco kaj kuraĝo  
Kaj proksimigas al ni la eternan amon de Dio.

Ni fidas je Dio, la Eternulo,  
Kiu estas nemezurebla amo, la bazo de nia ekzisto,  
Kiu montras al ni la vojon de libereco kaj justeco  
Kaj logas nin al estonteco de paco.

Ni kredas ke ni mem,  
Senfortaj kaj eraremaj kiel ni estas,  
Estas vokataj por  
Ligite kun Kristo kaj ĉiuj kiuj kredas  
Esti eklezio en la signo de l' espero.

Ĉar ni fidas je la estonteco de Dio kaj mondo,  
Je Dia pacienco kiu disponigas tempon  
Por vivi kaj morti kaj releviĝi,  
En la regno kiu estas kaj kiu estos,  
Kie poreterne Dio estos: ĉio en ĉiuj.

Al Dio estu la laŭdo kaj la honoro  
En tempo kaj eterno

*Amen*

### Klarigo

Kio interligas la remonstrantojn estas ilia aprobo de la Principeklaro.

Ĉi tiu mallonga deklaro diras, ke la Remonstranta Eklezio estas kredkomunumo kiu “radikiĝanta en la evangelio de Jesuo Kristo kaj fidela je la principo de libereco kaj toleremo, volas honori kaj servi Dion”.

Krom tio tra la historio la remonstrantoj je kelkaj momentoj vortigis sian kredkomunumon en kredkonfeso (en 1621 kaj en 1940).

Ke neniu kredkonfeso havas aŭtoritaton nekontraŭeblan, estas memkompreneble laŭ remonstranta vidpunkto.

La celo povas esti neniu alia ol “en singardemo kaj amo montri la vojon kaj informi” (laŭ la antaŭparolo de la kredkonfeso de 1621, citita en 1940).

En ĉi tiu spirito kaj en ĉi tiu intenco la Konvento de la remonstrantaj pastoroj en 2006 vortigis la kredkonfeson ĉi tie prezentitan.